

Priskribo de la ŝtonoj

Josef KAVKA (CZ)

El la ŝtonoj, kiujn liveris al mi prof. *Sachs*, plej interesan skulptitecon vidigas la unua specimeno. La belajn formojn sendube kreis maronda frapado

1. **Aleŭrolito** (polvoŝtono). Ties plej granda specimeno pezas preskaŭ 6 kilogramojn. Ĝia alteco estas kvaronmetra, perpendikla al la iom perceptebla tavoloeca teksturo. El tio eblas konkludi, ke la sedimento inklinas disfali prefere laŭ vertikalaj rompsurfacoj, dum la tavolsurfacoj, preskaŭ ebenaj, nur iomete ondformaj ne estas tiom forte gravaj por disfalado. La ŝtonkoloro estas tre hele bruna. Se oni "karesas" la ŝtonon per la manplato, oni preskaŭ ne sentas grajnecon, ĉar la polvoj, konsistantaj el kvarco, estas tre etaj (proksimume 0,1 ĝis 0,01 mm), tamen ne argilecaj (sub 0,002 mm). Inter ili sporade aperadas simile etaj gli-meroj (muskovit-skvametoj). Karbonata komponanto mankas, kiel pruvis ekzamenado per acidoj. Estas mirinde, ke tiu ĉi marsedimento, supozeble deponita en distanco ne tre proksima al la bordo, prezentigas kiel konsiderinde solida, tute ne inklinanta al disiĝado laŭ siaj subtilaj grajn-etoj. Tiom pli ĝi surprizas per la manko de calcito, kiu ja funkcius cemento. Jen kial allogas kolektanton ĝiaj belformaj skulptaĵoj...
2. **Konglomerato**. Tiu ĉi sedimento, deponita iom pli proksime al la marbordo, vekas atenton pro plataj rulŝtonetoj diversgrandaj (3 – 30 mm), diverskoloraj (blankaj, helbrunaj, grizaj, escepte eĉ nigraj). Verŝajne ilin alportis rivero kaj poste solide kunigis materialo analoga al la supre priskribita n-ro 1. Cetere ne temas precize pri konglomerato, ĉar ankaŭ la polvoŝtona komponanto partoprenas grave. Evidente, tiu ĉi ŝtono ne taŭgus por esti kolektata, ĉar ja mankas belforma skulptiteco. La surfaco eĉ havas kavajojn post elfalintaj rulŝtonetoj.

3. **Breĉioj**. Inter la liveritaj ŝtonoj troviĝas ankaŭ tute alispecaj, kiuj havas apenaŭ komunan trajton kun la specimenoj, priskribitaj sub 1 kaj 2. Ekzemple unu specimeno konsistas el blankaj, akre angulaj klastoj (3 – 10 mm), kuŝantaj en nigra karbosimila maso, evidente organik-devena. Kiamaniere tiu ĉi sedimenta materialo povas aperi enkadre de la ceteraj "adriatikaj ŝtonoj", jen demando nesolvebla sen detala teren-esplorado por malkovri plurajn fontojn. Ja troviĝas ankaŭ breĉioj malpli grand-eraj, kies koloraj ŝtonetoj (klastoj) estas kunigitaj per simile malhela baza maso.
4. **Sabloŝtono**. Kelkaj breĉioj grade transiras en psamitan grajnecon, kies klastoj pli helaj distingiĝas pro sia dimensio (1 - 2 mm) disde violkolora ĝis bruna baza maso. La ŝtono estas platforma, rondigita de akvo, do ĝi perfidas sian tavoloecan disfalon.
5. **Silicito** kun forte esprimita lamineca teksturo vidigas laŭsezonan alternadon de grizaj kaj blankaj horizontoj. La materialo estas silika.
6. **Siliko**. Plej homogenan, sengrajan strukturon havas rulŝtono (pli ol 10 cm), kies freŝa rompsurfaco memorigas pri "konko". La malhela vario de silikoj estas nomata **lidito** ("provista ŝtono"). Tia estas uzata por distingi oron disde aliaj metaloj. Tion la oraĵistoj faras helpe de nitrata acido.

Resume, ĉiuj ĉi ŝtonoj estas sen karbonata substanco, jen okazo neofta pri sedimentoj de maro.

(**Grava rimarkigo**: Enigma por mi estas la geologia aĝo. Ĉu kre-
tacea?)

Adreso de la aŭtoro

RNDr. Josef KAVKA, C.Sc.

Lužná 7 – Vokovice

CZ – 160 00 Praha 6

ĈEĤIO

Priaŭtora informo

Doktoro pri natursciencoj, kandidato de teĥnikaj sciencoj, profesia petrologo.